# S F E R I L O

San Francisco Esperanto Regional Organization (SFERO) is the Esperanto organization for Northern California from Fresno to the Oregon border. It exists to further the study, practice and use of the International Language Esperanto, to give beginners and experienced speakers opportunities to hear and speak Esperanto, to present programs on topics of importance, and to welcome visiting Esperantists.

---

**SFERO tutkore invitas vin al la oktobra kunveno**
**Sabato, 2a oktobro 2010**
**San Francisco Police Club House**
**(Park Police Station, Waller near Stanyan, San Francisco)**
**443rd monthly program of SFERO!**

**Orlando Raola, Prezidanto**

**1:30 Babilado**
**2:00 Programo**

I. . Prezentado de novaj membroj kaj gastoj

II. FLANC-kunsido 6an novembro

III. Ming ci Carroll legos Ĉinan Fablon, "Translokigo de Montoj" kaj prezentos pri Poeto Qu Yuan kaj Drak-boato Festivalo

` IV. Planado por la Zamenhof-Bankedo en januaro, 2011 - ĉu la 9a taŭgas?

V. Ceteraĵoj/Miscellany

VI. Anoncoj, Ĝisrevidoj, EsperManĝo

## PRI LA SEPTEMBRA KUNSIDO

Post la somera paŭzo, la SFERO-kunsido de septembro 2010 sprite komenciĝis per la kutima antaŭbabilado kaj bonvenigo de gastoj kaj membroj.

La membroj formale voĉdonis aboni tablon ĉe la ĉiujara FLANC-konferenco, la 6-an de novembro, kaj Ming Ĉi, Steĉjo Schwichow, kaj Ĉarli Galvin volontis prizorgi la tablon dum la tago.

Dreah Monticue prezentis laŭtlegadon de sia ege interesa ciencfikcia verkon "La Tria Paŝo," kaj poste sekvis ege interesa kaj vigla diskuto pri la plurmedia prezentaĵo "Utopia in Four Movements," kiun kelkaj el la membroj kune spektis en Berklio. Lusi sugestis ke ni eble invitu la direktoron por prezenti ion dum la Esperanto-USA Landa Kongreso 2011, okazonta en nia golfa regiono.

Post tiu diskuto, nia ĉiam atentema Lingva Policano menciis kelkajn lingvajn erarojn kaj la kunsido fermiĝis je la 3-a ptm. Tuj sekvis kunsido de la Loka Kongresa Komitato, vokita de nia prezidanto Oorlando, dum kiu diskutiĝis kelkaj eblecoj pri hoteloj kaj transporto dum la kongreso.

Kelkajj SFERanoj poste iris kune al loka Taja restoracio por v(E)spermanĝi.

**[Dankon al protokolisto Steĉjo Schwichow pro la raporto]**

**SFERO - San Francisco Esperanto Regional Organization**
2389 Thackeray Dr., Oakland CA 94611
Orlando Raola, President
Georgo Baker, Vice President, Programs
Ĉarli Galvin, Jr., Vice President, Public Relations
Vilĉjo Harmon, Secretary/Treasurer
Steven Schwichow, Asst. Secretary

**97a Japana Esperanto-Kongreso**
**9-11 oktobro 2010, en Nagasako**
Por informo vidu: http://esperanto.jp/jek10n/eo.html

**JARKONGRESO DE ESPERANTO-U.S.A.**
**3-6 JUNIO, 2011**
**Kongresejo: Hilton Garden Inn, Emeryville CA**
**Pli da detaloj aperos baldaŭ.**

## UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

**La 96a U.K. estos en Kopenhago, Danio**
**23-30 julio 2011**
**Baldaŭ aperos informo pri la Kopenhaga UK en la retpaĝo de UEA: www.uea.org**
**La 97a UK estos en Hanojo, Vjetnamio**

**8A TUT-AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO**
**9-14 JULIO 2011**
**Ĉe Santa Marcelina, São Paulo, Brazilio**
**Informo: http://www.esp.org.br.kongreso**

**NASK 2011 -** La plej bonaj somaraj kursoj en Esperanto! Informo pri NASK 2011 haveblos baldaŭ estontece. **aŭ kontaktu Ellen Eddy, eddyellen@aol.com.**

**KLASOJ**
**STANFORD** - 21st year of "Conversational Esperanto" at Stanford University at Bechtel International Center (instructor: **Ed Williger**). Tuesdays 6:30-8:30. Info: [650] 493-3646 or http://Esperanto.Org/stanford.

**CLUB MEETINGS**
**BERKELEY** - Ĉiun ĵaŭdon vespere je 6:30-7:30 ptm, babilada grupo renkontiĝas ĉe Cafe Pollo, 100 Berkeley Square (Shattuck & Addison).

**SACRAMENTO** - Monthly on the second Friday, \\5:30 - 7:00 PM at the Sacramento Natural Foods Co-op, 1900 Alhambra. For information call **Doug Leonard**, [916] 363-5733.

**SAN FRANCISCO: SFERO -** (Almost) always on first Saturday of the month. Phone **Vilĉjo Harmon at** [510] 531-8393 for information.

**SAN FRANCISCO -** Babilada grupo.
Porinforme: **Steĉjo, [415] 665-7646** aŭ schwichs@gmail.com

**SUDGOLFA REGIONO -** Neformala lunĉgrupo kunvenos unu horon ĉiun alternan ĵaŭdon je 12:30 ptm ĉe loko kutime en Sunnyvale. Informo pri loko havebla de **Julie** ĉe [650] 799-7227 aŭ pjspickler@gmail.com.
Ĉiuj bonvenaj!




**REMEMBERING OLD FRIENDS - CATHY**

For all your travel needs,
call Lusi at
Esperanto Vojaĝ-Servo
[510] 531-8393